

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 42, Aŭgusto 2021



*Somera teatro en la parko de la domo "Kronhuset".*

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

## Enhavo

Enhavo.....	2	Bravaj infanoj eskapas kidnapon .....	19
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Minembwe – profunda tombo por Banjamulengoj .....	21
Espeporko meditas.....	3	La monda tago de rifuĝintoj, la 20an de junio .....	22
La librorondo – aŭ legorondo – pluiras.....	4	La tutmonda lingva afero – Den ĝlobala språkfrågan .....	24
Gotenburgaj klubanoj ekskursis al la Nolhaga parko en Alingsås, la 3an de julio ....	4	La kliniĝanta kolono .....	26
En la Nolhaga Parko, Alingsås – I Nolhagaparken, Alingsås .....	5	Kio estas ARGËNTO en diversaj lingvoj – Vad är SILVER på olika språk.....	27
Komento de Walter Klag .....	8	Patro kaj filo.....	29
La Esperanto-tago, la 26an de julio.....	8	Hans Georg Kaiser havas orminejon de amuzaj bildoj.....	30
Peco de la inaŭguro de la 2a Virtuala Kongreso.....	9	”Ridinda ŝerco” .....	30
La Eŭropa Himno en pluraj lingvoj.....	9	Kata vivo – Kattliv.....	31
Poemo de Lenka Szász – Metempsikozo.....	10	Mi amas librojn .....	32
Mezsomera festo sur insulo Sarvsalö, Finnlando.....	11	El Pollando .....	33
Someraj hajkoj.....	11	Okazoj dum 400 jaroj en Gotenburgo!.....	34
Memoroj pri vizitoj en Gotenburgo .....	12	Delaware, la nova kolonio, ”Nova Svedio” – ”Nya Sverige i Delaware” 1637.....	34
Esperanto kaj la kverko .....	14	Varioloj dum 1757 – Smittkoppor anno 1757 .....	35
Inundo en la norda parto de Germanio .....	15	Sukerfarejo en ”Klippan” – Sockerbruket i Klippan anno 1808 .....	36
Inundoj ankaŭ en Aŭstrio.....	15	Virinoj en la Politiko – Kvinnor i politiken anno 1910 .....	38
Incendioj en Siberio.....	16		
Kontraŭ nukleaj armiloj – Mot kärnvapen...17			
Matene je 8a horo 15 en Hiroŝima .....	17		
Poemo – Lulkanzono – Infaneto de milito...18			

## Pri Ora Ĵurnalo



Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com).  
Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!



## Espeporko meditas



- ☆ Baldaŭ startos la nova esperanta agadsezono. Ĉu sur la bildo estas esperantisto, kiu gajnis premion pro mikronovelo? Aŭ ĉu sportisto en Tokio? Aŭ ĉu fuĝinto el Kongo Kinŝasa? Mi ne scias ....sed...
- ☆ Troviĝas multaj rifuĝintoj ene en siaj gepatraj landoj. Tamen vi devas trapasi landlimon por ke UNHCR aprobu vin kiel rifuĝinton. Neniu deziras esti rifuĝonto, sed se la alternativo estas resti kaj vivi kun timo pro ribelatakoj, oni elektas vivi en alia lando.
- ☆ Strange ke el Svedio ne venis eĉ unu artikolo pri la somero kaj pri somermezfestoj. Sed el Finnlando Saliko sendis fotojn pri somera festo. Oni ja devas memori la longan, varman someron, ĉu ne?
- ☆ Ingegerd iniciatis ekskurson al Alingsås, "la terpoma urbo". Ĉirkaŭ 20 personoj partoprenis kaj renkontis "la patronon de terpomoj", Jonas Alströmer, de la 18a jarcento. Li regalis nin per novkuiritaj freŝaj terpomoj.
- ☆ Katastrofoj ĉiam okazas ie en la mondo, sed eble pli ofte nun pro la klimatkrizo. Vi povas legi pri inundoj kaj incendio.
- ☆ Sciencetajn artikolojn sendis Lasse kaj Inga, – Lasse pri kliniĝanta kolono kaj Inga pri vortelekto el multaj landoj pri la metalo arĝento.
- ☆ Kortuŝan veran rakonton pri kvar kidnapitaj infanoj sendis Espoir Kasati. Li mem trovas Kongo Kinŝasa tro danĝera kaj

serĉas novan, pacan landon. Ĉu vi havas proponon?

- ☆ Kortuŝa estas la poemo pri "Infaneto de milito", sendita al ni de Torben Svendsen, Danio. La finaj linioj pensigas min: **"Infaneto de milit', kien vi iros? Elektu mem, nur ni neniam vin revidu."** Ĉu ni vere estas tiom senkoraj?????
- ☆ La lastaj linioj de la poemo de Lenke Szász ankaŭ pensigas min: **"Animo ne loĝas en tombo, animo ne fariĝos polvo."** Kiel ŝatatan lokon post la morto, ŝi elektas la mirindan grekan marbordon. Kion mi elektu?
- ☆ Gotenburgo celebros la 400-jariĝon dum kelkaj jaroj!! Ni ĝojas pri artikolo de Torben pri vizito en la urbo. Ĝi okazis antaŭ ol oni komencis fosi en la tuta urbo por krei tunelojn por trajnoj kaj aliaj trafikiloj.
- ☆ Ĉu vi scias ke Svedio iam havis kolonion? Jes, veras, ja estis "Nova Svedio", Delaware inter 1580 kaj 1638. Fakte oni ne batalis por ekhavi Delaware, sed aĉetis la kolonion.
- ☆ Ingegerd skribis pri eventoj dum kvar jarcentoj. Iel ili ĉiuj havis influon sur Gotenburgon. – En 1637 – Delaware, en 1757 – la variola malsano, en 1808 – la sukerfarejo en Klippan kaj en 1910 – virinoj en la politiko.
- ☆ Estus interese scii pli pri virinoj en la politiko. Virinoj, ĉu vi faris vian politikservan devon? Se ne...kial ne?

/Siv

# La librorondo – aŭ legorondo – pluiras



Nun ni por la aŭgustokunveno diskutos ĉapitron sep (el 14) de *Sesdek ok* de Sten Johansson. La

partoprenantoj ja loĝas vaste kaj kiam estas la 17a horo en Svedio, en Litovio estas la 18a kaj en Britio nur la 16a.

Ni nun pli malpli bone konas la rolulojn: Björn, Dani, Marie-France, Christian kaj Henry. Ingrid, al kiu Björn tuttempe direktas sian parolon, ni ankoraŭ nur iomete konas. Krom la interrilatajn aferojn de la libro ni ankaŭ diskutos aliajn aferojn: pri vegetarismo, la (fi)fama parolo de de Gaulle en Kanada kaj la ŝercaj verkoj de Raymond Schwartz. /Siv

## Gotenburgaj klubanoj ekskursis al la Nolhaga parko en Alingsås, la 3an de julio

La malsupra bildo montras Alingsås en la tempo ĉirkaŭ 1700. La bildo estas prenita el la libro "Suecia antiqua et hodierna" de Erik Dahlberg. Li volis ŝajnigi ke Svedio estas granda lando kun grandaj urboj, sed fakte nur 150 personoj loĝis en Alingsås en 1720. Nur kiam Jonas Alströmer fondis teksaĵan fabrikon tie, la urbo ekkreskis.

Nuntempe la urbo estas konata kiel "La terpoma urbo" – pro Jonas Alströmer. Ĉiun someron oni havas terpoman festivalon sur la Granda Placo kun multaj vizitantoj.



(Ĉiuj akceptis esti 'fotitaj'.)



Jonas Alströmer (= Lasse Granat) admonas la homojn manĝi terpomojn. *Sten Svenonius* fotis.



## En la Nohaga Parko, Alingsås – I Nohagaparken, Alingsås

Jan Bondesson (plej maldekstre) rakontas pri la deveno de la nomo Nohaga. "Nola" oni nomis terpomon iam kaj en la parko oni kultivis "nolor" – terpomojn, per iniciato de Jonas Alströmer!

*Jan Bondesson (längst till vänster) berättar om ursprunget till namnet Nohaga. "Nola" kallade man potatis förr och i parken odlades nolor – potatis, på initiativ av Jonas Alströmer!*



Muzikistoj: Jesper, Margareta kaj Christin. Estis 30 gradojn, sed arboj donis ombrojn.

El la 18a jarcento subite Jonas Alströmer venas al ni (por lerni Esperanton???)

*Från 1700-talet kommer plötsligt Jonas Alströmer till oss (för att lära sig esperanto???)*



Li kuiras terpomojn por regali nin. Li ne tre aprezas la manĝaĵkulturon de la 21a jarcento.

Li faras edukadan parolon:



**La parolo de Jonas Alströmer (aŭ tiu de Lasse Granat):**

- Rizo kaj pastaĵoj! Kaj mi nur diras tion suŝio! SUŜIO!!! FI!
- Ĉu vi tute perdis vian saĝon, nun en la 21a jarcento?
- Kien malaperis la saĝo pri manĝaĵo, mi nur demandas.....
- Ĉie oni manĝas strangaĵojn, eĉ el Ĉinio kaj Tajlando!
- Ĉi tie en Svedio! Ĉie mi vidas homojn sidantajn, manĝantajn siajn dolĉaĉajn picojn.
- Oni manĝu terpomojn, fakte estis la terpomoj, kiuj savis multajn de malsato kaj skorbuto en mia epoko kaj multe da vitaminoj ankaŭ troviĝas en ĝi.
- Kion vi tagmanĝis hieraŭ? (li elektas iun el la publiko).
- Ĉiuokaze hodiaŭ estos terpomoj.
- (Li grumblas) suŝio, rizo... Hmm..
- Cetere la skorbuto povas reveni, se vi ne gardos vin.
- Sed vi supozeble manĝas iun vitaminpilolon aŭ iun alian multekostan rubaĵon.

**Jonas Alströmers tal (eller kanske var det Lasse Granats):**

- *Ris och pasta! Och jag säger bara sushi! SUSHI!!!*
- *Har ni helt tappat förståndet nu på 2000-talet?*
- *Vart har förståndet om mat tagit vägen, jag bara frågar...*
- *Överallt äts det märkvärdigheter till och med från Kina och Thailand!*
- *Här i Sverige! Överallt ser jag folk sitta och äta sina sliskiga pizzor.*
- *Man skall äta potatis, det var faktiskt potatisen som räddade många från både svält och skörbjugg på min tid, och mycket C-vitamin finns det i den också.*
- *Vad åt du till middag igår? (väljer ut någon i publiken).*
- *Idag blir det i alla fall Potatis!*
- *(Muttrar) sushi, ris.... Hmm...*
- *Förresten så kan skörbjuggen komma tillbaka om ni inte passar er!*
- *Men, ni äter väl något vitaminpiller eller något annat dyrt skräp.*

- Anstataŭ, manĝu terpomojn!!
- Hodiaŭ surtabliĝas freŝaj terpomoj, butero, pano kaj fromaĝo.
- Ni gustigas per aneto, petroŝelo kaj ŝenoprazo. Poste oni finaldonas al la delikataĵo iomete da acida kremo....
- Bonvenon al la tablo! Vi devas manĝi terpomojn!!!
- Mi instruos al vi!
- Bonvenon!

Poste li regalas nin per novkuiritaj terpomoj. Troviĝis kelkaj neesperantistoj, kaj ili povis trovi proprajn "instruistojn". Poste oni postulis ke ili diru kelkajn frazojn kaj kelkajn legomojn en Esperanto.



Entute estis agrabla tago – la unua post la pandemio kun tiom multaj personoj samtempe.

Ingegerd kaj Lasse planis ĝin, aliaj ankaŭ kontribuis. Bone ke estis kelkaj

Alia foto pri muzikistoj en Nohaga:

Ni ankaŭ iomete trejnis por venonta aŭtuna prezentado en biblioteko de Gotenburgo.

Margareta Andersson intervjuis Ludoviko Zamenhof (Sten Svenonius) pri lia opinio de la evoluo de Esperanto. Ni ankaŭ kantis du kanonojn kaj ni certe iam aŭtune en gotenburga biblioteko kantos:

- Ät potatis istället!
- Idag serveras färsk potatis, smör, bröd och ost.
- Vi smaksätter med dill, persilja och gräslök, sedan toppar man delikatessen med lite gräddfil...
- Välkomna till bords! Ni måste äta potatis!!!
- Jag ska lära er!
- Välkomna!

Sedan bjöd han oss på nykokt potatis.

Det fanns några icke-esperantister och de kunde hitta egna "lärare". Sedan fordrade man att de skulle säga några fraser och några grönsaker på esperanto.



neesperantistoj, kiuj povis trovi proprajn instruistojn kiuj instruis ilin pri la elparolo kaj kiel diri kelkajn frazojn. Kompreneble ĉiuj poste konis la esperantan vorton TERPOMO.



**Bonan venon jen al Gotenburg’  
Al la brila kaj tre gaja urb’  
Plenviva haveno  
Kaj flora ĝardeno  
Brakumas vin en Gotenburg’.**

Hodiaŭ tamen estis: Bonan venon jen al Alingsås.


Ni nun ne scias en kiu biblioteko ni prezentos Esperanton kaj je kiu dato – sed kiam ni scios, ni informos vin per [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org) /Siv

## Komento de Walter Klag

La historio de la terpomo estas interesa. En Prusio la homoj unue manĝis la foliojn, kiuj estas ja venenaj. La prusa reĝo Frederiko la 2a (Friedrich der Große) ekkonis, ke la terpomaj tuberoj estas bonega nutraĵo – kiel vi jam skribis. Frederiko havis privatan terpombedon, kiun la soldatoj gardis nur ĝis la komenco de la nokto, por ke oni povu ŝteli la valorajn plantojn. Tiel la terpomo iĝis populara en Prusio.

***Du är välkommen till Göteborg  
Till ett glittrande glatt Göteborg  
Den brusande hamnen  
Bjuder dig stora famnen  
Till ett hjärta som är Göteborg.***

*Idag var det emellertid. "Du är välkommen till Alingsås".*



## La Esperanto-tago, la 26an de julio



**Lotta Lauritz**, de la Norrlanda Esperantoklubo, invitis per Facebook al zoom-kunveno por celebri la Esperanto-tagon. Ok personoj partoprenis. Estis amuza kunveno, sed ni konstatis ke tiu tago estis malmulte celebrata kompare kun la Zamenhofa tago – La tago de Esperantolibro – la 15an de decembro. Ofte la Esperanto-tago, la 26an de julio, okazas samtempe kun la UK – aŭ VK (Virtuala Kongreso). – Krome, almenaŭ en nia mondparto, multaj tiam libertempas.

Pro kio oni atentigas tiun tagon? Jes, la Unua Libro, la unua lernolibro de la Lingvo Internacia aperiĝis je tiu dato. La rusa cenzuro permesis ke oni disvastigu la libron.

En Norrlando ne loĝas multaj esperantistoj kaj en la tuta lando la tendenco estas malkreskanta esperantaro.

Ni ankaŭ diskutis la ne-kono de *Ora Ĵurnalo* en Svedio. Kial ĝi ne estis pli reklamata?

Lotta bakis esperantan torton – tre belan, sed por ni gustumi ĝin ja ne eblis.

Iniciato de esperantistoj de la tuta lando bonveniĝas. Koran dankon, Lotta!!! /Siv

**La 24an de julio la gazeto *Norrländska Socialdemokraten* skribis pri Lotta Lauritz kaj la Esperanto-tago. /Siv**



# Peco de la inaŭguro de la 2a Virtuala Kongreso

Bedaŭrinde mi ne havis eblecon spekti multon de la programeroj, kiuj okazis dum la tuta tagnokto por ke la tuta mondo havu eblecon partopreni. Miaj filoj, bofilino kaj nepo estis ĉe mi. Krome – la vetero estis bonega.

Vendrede, la 16an de julio, estis anoncita filmo pri la Nacia Vespero de UK en Gotenburgo 2003. Jen ligilo al la filmo: <https://www.youtube.com/watch?v=YCe-GXypAPw>

La muzikgrupo Asorti donis koncerton lige al la malfermo de la Virtuala Kongreso.



Anstataŭ havi unu reprezentanton el ĉiu lando por deziri fruktodonan laboron al la Kongreso, oni ĉi tiun fojon havis po unu reprezentanton de la kvin mondpartoj.

”En la mondon venis nova sento” – ĥoro ankaŭ troviĝis, sed nun eblas aŭskulti la vortojn kiam solisto kantis kun la ĥoro kiel fono. Ŝi kantis tre klare, tre sonore!



Fernando Maja, vicprezidanto de UEA, malfermis la VKn.



Mi vidis aliajn programerojn, sed vi ja mem povas vidi pli ĉe UEA. /Siv

## La Eŭropa Himno en pluraj lingvoj



Adrienne Paŝtor sendis la malsuprajn ligilojn. G. Pirlot kolektis tradukojn de la Eŭropa Himno.



Per la unua ligilo vi povas vidi tradukojn de la himno ne nur al la ordinara EU-lingvoj sed ankaŭ al kelkaj etnaj lingvoj.

**El Vikipedio:** La Eŭropa Himno konsistas el parto de la lasta frazo de la naŭa simfonio de Ludwig van Beethoven. La teksto estas poemo de Friedrich von Schiller: ”Al la Ĝojo”.

La Eŭropa Himno estis adoptita en 1972 de la Eŭropa Konsilio kiel himnon por la Eŭropo.

En 1985 ĝi ankaŭ estis adoptita kiel himnon por la Eŭropaj Komunecoj, plej poste La Eŭropa Unio.

**Från Wikipedia:** *Europahymnen består av en del av den sista satsen av Ludwig van Beethovens nionde symfoni. Texten är en dikt av Friedrich von Schillers dikt Till glädjen.*

*Europahymnen antogs 1972 av Europarådet som hymn för Europa.*

*1985 antogs den även som hymn för Europeiska gemenskaperna, sedermera Europeiska unionen.*

Pro la granda nombro da lingvoj, uzataj en Eŭropo, la himno estas tute instrumente muzika kaj la germana teksto ne havas oficialan statuson.

Tamen la germana teksto estas tradukita en multajn lingvojn. Ne tre praktike kanti la saman himnon samtempe en multaj lingvoj. Do, kial ne uzi la ESPERANTAN TEKSTON – la neŭtralan solvon!

**Kantu kune amikaro  
Ni la ĝojon festas nun  
Nek rivero, nek montaro  
Plu landlimoj estas nun.**

**Ho, Eŭropo, hejmo nia,  
Tro daŭradis la divid',  
Nun brilegu belo via,  
Ĉar estas via id'.**

## Poemo de Lenka Szász – Metempsikozo

Kiam alvenos la vivfino,  
kien ekiros la animo?  
Ke ĝi neniĝos samtempe  
Ja por mi estas nekredible.

Metempsikozo, mia revo –  
Estas postmorte iĝi mevo,  
Flugi super la greka maro –  
Mia granda dumviva amo.

Bluos la eterna ĉielo,  
Brilos sub mi mara senfino.  
Animo ne loĝas en tombo,  
Animo ne fariĝos polvo.

*På grund av det stora antalet språk som används i Europeiska unionen är hymnen rent instrumental, och den tyska texten av Friedrich Schiller har ingen officiell status.*

Pliaj versoj per:

La Eŭropa Himno en pluraj lingvoj:

<https://www.euroopa.eu/fr/documentloader.php?id=319&filename=europa-himno-tradukoj-retejo.pdf>

Eŭropa Himno (Esperanto) – Ostenda Koruso:

[https://www.youtube.com/watch?v=13Z982q\\_UVw](https://www.youtube.com/watch?v=13Z982q_UVw)

Esperantoteksto de la himno:

<https://www.youtube.com/watch?v=NRv0asAlwDU>



# Mezsomera festo sur insulo Sarvsalö, Finnlando


Raita Pyhälä – Saliko – sendis fotojn.

Tie oni parolas kaj la finnan kaj la svedan. Ĝi troviĝas en la orienta parto de la finnlanda arkipelago. Dankon, Saliko!



## Välkommen/Tervetuloa/Bonvenon al Sarvsalö/Sarvisalo, libertempa paradizo oriente de Helsinki!

La tuta Sarvsalö estas al via servo, la insulo kun la ĉarmaj strandoj, markoloj kaj golfetoj, kanoj kaj klifoj kaj brilanta maro, strandaj herbejoj, ondformaj pejzaĝoj, fekundaj kampoj. Somere, kaj nuntempe ankaŭ pli kaj pli vintre, printempe kaj aŭtune, la insulo transformiĝas al feria paradizo.



## Someraj hajkoj

Ĉi tiu somernokto –  
kaj la luno kiu flugas  
inter nuboj

*Ranko*

Ĉio estas trankvila  
alciono flugas  
super la montolago

*Shiki*

# Memoroj pri vizitoj en Gotenburgo

Torben Svendsen

*Jen kelkaj fotoj el la Gotenbarga urbo parto "Haga", 2017, 2019 kaj Botaniska Trädgården kun iometo da teksto en Esperanto.*

*Bonajn Salutojn de Torbeno*



Jen kelkaj fotoj, el la belega urbo Gotenburgo, 2017, 2019.

Estas vere multaj belaj kaj interesaj lokoj/regionoj en Gotenburgo.

Oni plej facile povas veni de loko al loko per publikaj trafikiloj en la urbo, ĝenerale bone funkciantoj kaj je akcepteblaj prezoj.


Ĉefe estas reto de tramoj kaj diversaj aŭtobusoj facile uzeblaj, kaj ĉefe pagebla per elektronikaj rabatkartoj uzeblaj en la tuta urbo.



Ofte mi ŝatas viziti la ĉarman malnovan urboparton – Haga, kun la diversaj malnovstilaj butikoj, manĝejoj, promenadaj stratoj, lignaj domoj kun iom da etoso el la malnova epoko de Gotenburgo.



Proksime de Haga centro kaj la trafika krucvojo – "Järntorget" – troviĝas "Esperanto-platsen" kun la kafejo "Språkcafé", eble iom interese por Esperanto-parolantoj.



Dum la somera tempo mi ne volas eviti travivi la belegan "Botaniska Trädgården" / "Botanikan Ĝardenon".

La loko enhavas multajn rarajn, belajn kaj ekzotikajn plantojn, arbojn kaj florojn – en forcejoj kaj ekstere en belaj floranĝoj kun akvofaloj.





Je la havenfronto estas pluraj boatoj por transporti vin al kelkaj de la multaj vidindaj insuloj en la bela Gotenburga arkipelago.

**Dankon Torben. Gotenburgo devus dungi vin kiel reklamdirektoron. /Siv**



## Esperanto kaj la kverko

de Lasse Granat

Antaŭ tri jaroj ni plantis etan kverkon dum ceremonio sur herbejo hejme. Devas esti vera "Esperanta kverko" ĉar ĝi disvolviĝas preskaŭ same kiel la lingvo mem.

Post la unua vintro ĝi komence ŝajnis senviva. Sed poste vere venis etaj folioj kaj la kverko komencis kreski.

Ni akvumis la planton kaj ni forprenis trudherbojn. De la radiko subite ekkreskis branĉeton, kiel ido de la planto.

Poste, la sekva vintro venis, kaj ĉiuj folioj defalis. Kiam la neĝo degelis en tiu

printempo, la tuta herbejo estis kovrita per altaj filikoj, tiel ke oni ne povis vidi la kverkon. Same kiel certaj lingvoj sufokigas esperanton. Ni forprenis la filikojn por vidi la kverkon, sed la planto denove ŝajnis senviva.

Tamen, post akvumado kaj sunbrilo la kverko denove ekkreskis. Krom la branĉeto, la ido.

Do, kverkoplantoj eble estas similaj al lingvoj:

- oni devas forpreni sufokantajn trudherbojn
- oni devas prizorgi ilin
- flankaj ŝosoj ne ĉiam transvivas.



# Inundo en la norda parto de Germanio

Inga Johansson kaj mi antaŭ multaj jaroj per aŭto trapasis tiun regionon survoje al UEA, Roterdamo, por aĉeti librojn por la urba biblioteko en Gotenburgo.

Tiam ni neniam povis imagi, ke ion tian kiel la inundo povus okazi:

<https://reportage.wdr.de/hochwasser-nrw-vorher-na-dher-fotos#chapter-140>

Mi memoras ke ni trovis esperantajn vortojn survoje... Ekz. **Kiel**, kaj post tempo ankaŭ **Tiel**.

En Nederlando troviĝis **Rabobanko**.

/Siv



## Inundoj ankaŭ en Aŭstrio

La 18an de julio "La reta kunveno de la Monda Muzeo de Wien" traktis tiun temon.

**Walter Klag** sendis tiun ĉi raporton de la diskutado:

*El Babilejo (Chat):*

Inundegoj okazis en julio 2021 ankaŭ en Aŭstrio, kvankam malpli ol en 2002.

Kiuj estas la kialoj? Nun oni krias ne nur "Klimatŝanĝiĝo! Karbona dioksido!", sed pensas jam ankaŭ pri la multaj aliaj, pli gravaj kialoj.

La inundegoj estas kaŭzitaj de:

1. Kanaliĝo de riveroj kaj riveretoj. La pluvakvo fluas rapide suben en rekta linio. Se pluvegas la akva nivelo ege plialtiĝas en tiuj kanaloj kaj la akvo fluas poste ambaŭflanke de la kanaloj.
2. Oni konstruas domojn ĉe la bordo de ĉarmaj riveretoj, kiuj du- aŭ trifoje dum unu jarcento iĝas riveregoj.
3. Grandaj areoj estas kovritaj de asfalto kaj betono, de kie pluvakvo fluas rapide for kaj kaŭzas inundojn.

4. La moderna agrokulturo produktis grandajn areojn de maizkampoj por nutri porkojn. Tia grundo ne povas suĉi multe da akvo, sekve la pluvakvo fluas rapide for.

5. En multaj lokoj oni forhakis la arbaron, kiu povas reteni multe da akvo; kaj tiel plu.



*Überschwemmung in Hallein, Salzburg, Austria (Österreich) 17.7.2021*

## Incendioj en Siberio

**Albert Aubin** Esperanto skribas en Facebook:

Siberio: 800 000 hektaroj da arbaroj estas detruitaj de incendioj: la degelo de la tundro liberigas katastrofajn kvantojn da forcejefikaj gasoj.

Tiu senprecedenca situacio kaŭzita de la nekutimaj altaj temperaturoj en la tundro atestas pri la detruaj efikoj de la klimata ŝanĝiĝo.





# Kontraŭ nukleaj armiloj – Mot kärnvapen



**Karin Utas Carlsson**, la prezidanto de "Fredens Hus" (La Domo de la Paco), organizo en kiu Esperanto-Societo de Gotenburgo membras, skribis leteron al la membroj. Mi libere prenas parton de ĝi. /Siv

*Fredsgudinnan "Nuclear disarmament" Skulptur och foto: Bertil Gustafsson.*

## Saluton geamikoj de la Paca Domo, Gotenburgo!

[.....] nun estas ege multe da kunlaboro inter organizoj kaj homoj por trudi al la registaro kaj parlamento aligi Svedion al la internacia pakto kontraŭ nukleaj armiloj.

Laborgrupo de i.a. pac- kaj medimovadoj startis landan kampanjon "Nukleara malpermeso. Nun!"

Ĝi estis lanĉita en la Hiroŝima-tago, la 6an de aŭgusto. Ĝis nun ni sukcesis kunmeti 44 organizojn kaj grupon da famuloj, kiuj apogas la kampanjon.

Pri ĉio vi povas legi sur nia retpaĝo: [www.fredenshusgoteborg.se](http://www.fredenshusgoteborg.se) (svede)

La kampanjo havas propran retpaĝon:

<https://www.laraforfred.se/fredrorelsen/kampanj-karnvapenforbud-nu>

## Hej fredsvänner Fredens Hus Göteborg!

[...] nu är det väldigt mycket samarbete mellan organisationer och människor för att pressa regering och riksdag att ansluta Sverige till det internationella förbudet mot kärnvapen.

En arbetsgrupp från bl a freds- och miljörelsen har startat en rikskampanj "Kärnvapenförbud. Nu!"

Den lanseras på Hiroshimadagen den 6 augusti. Vi har hittills lyckats få ihop 44 organisationer och en grupp kända personer som stödjer kampanjen.

Allt detta kan ni läsa om på vår hemsida [www.fredenshusgoteborg.se](http://www.fredenshusgoteborg.se).

Kampanjen har en egen hemsida:

## Matene je 8a horo 15 en Hiroŝima

*Ekstrakto el "Kun la Kadavro de l' Edzino" de OGURA Toyofumi, trad. TAMAKA Sadami.*

En tiu momento mi estis sur strato 4 kilometrojn for de la 'eksploĉcentro'. Tiam mi estis sur revenvojo de frumatena okupo.

Estis serena mateno. Fulmobrilo grandega kvazaŭ magnezio ekbruliĝinta, plene en la ĉielo!

Mi reflekse ĵetis min surventre sur straton. Samtempe kun la fulmo, ŝajne, mi sentis varmegon sur mia tuta haŭto.

Tempa malpleno regata de absoluta silento.

Post kelkaj sekundoj – supozeble 'kelkaj sekundoj', mi ne scias precize – tondris vastega granda bruo: d-o-o-ng. Samtempe fortega ventopremo subpremis min, la tutan korpon. [daŭrigo en p. 39]

# Poemo – Lulkanzono – Infaneto de milito

de Henrik Nordbrandt

**Torben Svendsen** sendis la poemon al ni kun koraj somersalutoj. La poemo estas ja en la dana. Mi demandis al li, ĉu li volus traduki ĝin en Esperanton. /Siv

Jen lia respondo:

'Tradukado de poemoj estas malfacila arto, kaj ne estas mia kompetento. Sed pro la grandanima enhavo kaj karaktero de la poemo, ĝi fakte inspiris min kun humileco provi "traduki" ĝin al Esperanto. Mia unua legado de la poemo tiel forte impresis kaj

trafis min (kaj multaj aliaj danoj) en la koro, kaj tial mi provas transdoni iom de la emocioj kaj energio, kio estas en la poemo – al kelkaj aliaj homoj.


La poemo aperis sur la frontpaĝo de la dana taggazeto **Politiken** en septembro 2015. Pro la publika vigla kaj akra debato pri senhejmeco kaj pro la pli kaj pli grava situacio en Eŭropo por multaj militaj rifuĝintoj kaj enmigruoj, la poemo vekis fortan intereson kaj debaton en Danio.'

## Lille krigsbarn – Vuggevisse

Lille krigsbarn, hvor går du hen?  
Mod øst eller vest?  
Hvor i verden tror du  
du finder en ven?  
Lille krigsbarn, hvad passer dig bedst:  
Et hullet tæppe?  
En krydsfinerskiste?  
En redningsvest?  
Lille krigsbarn, hvor vil du dø:  
Hvor bomberne falder  
eller i åben sø?  
Lille krigsbarn, hvor vil du hen?  
Vælg selv. Bare vi aldrig skal se dig igen.

## Infaneto de milito – Lulkanzono

Infaneto de milit' kien vi iras?  
Ĉu orienten aŭ okcidenten?  
Kie en la mondo vi pensus  
trovi amikon?  
Infaneto de milit', kio plej konvenas al vi:  
Ĉu truita plejdo?  
Ĉu tavolligna ĉerko?  
Ĉu savoveŝto?  
Infaneto de milit', kie vi mortos:  
Ĉu tie, kie falas la bomboj  
aŭ en vasta maro?  
Infaneto de milit', kien vi iros?  
Elektu mem, nur ni neniam vin revidu.



La dana verkisto kaj poeto, Henrik Nordbrandt.

(Esperanta traduko: Torben Svendsen, Danio)

La poemo venas el lia libro: *Den store amerikanske hævn og andre digte*.

Ligiloj al biografioj pri la verkisto, poeto Henrik Nordbrandt:

<https://litteratusiden.dk/forfattere/henrik-nordbrandt>

[https://da.wikipedia.org/wiki/Henrik\\_Nordbrandt](https://da.wikipedia.org/wiki/Henrik_Nordbrandt)

Klarigojn al la poemo: Lille krigsbarn – Vuggeviser / Infaneto de milito – Lulkanzono:

<https://politiken.dk/kultur/art5590535/Et-digt-bryder-ind-i-verden>

[https://www.youtube.com/watch?v=ue1lelB\\_1go](https://www.youtube.com/watch?v=ue1lelB_1go)

**Karaj legantoj, Ĉu vi havas ideojn pri la du lastaj linioj en la poemo? Se jes – skribu al Ora Ĵurnalo!**



*Henrik Nordbrandt: "Den store amerikanske hævn og andre digte", Gyldendal, 72s. 2017.*

## Bravaj infanoj eskapas kidnapon

Artikolo de Espoir Kasati por Ora Ĵurnalo

Sude de Demokratia Respublika Kongo, en Urbo **Lubumbashi**, kvar infanoj de sama familio brave sukcesis eskapi makabran situacion en la kvartalo Somika, municipo Commune Annexe. Tiuj infanoj, malpli ol 10-jaraj, estis prezentitaj al municipestro Rémy Munsense ĉi-marde 13an jul 21, savitaj.



### La kvar infanoj kidnapitaj

Laŭ la pli aĝa infano, maldekstre sur la bildo. La sceno okazis frue posttagmeze la lastan lundon. Ni amuziĝis ekster nia hejmo kiam, subite, nekonataj homoj forkaptis kaj enirigis nin en nigran aŭton kaj tuj veturis al nekonata loko, diris la brava etulino.

Söder om Demokratiska Republiken Kongo, i staden **Lubumbashi**, lyckades fyra barn från samma familj med stort mod fly från en makaber situation i kvarteret Somika, en stadsdel i utkanten. Dessa barn, som var yngre än 10 år presenterades för chefen för stadsdelen, Rémy Munsense, i tisdags den 13e juli – räddade!

### De fyra kidnappade barnen

Enligt det äldsta barnet, till vänster på bilden, inträffade händelsen tidigt på eftermiddagen i måndags. Vi lekte och hade roligt utanför vårt hem, när okända människor plötsligt förde bort oss och satte oss i en svart bil och genast körde de oss till en okänd plats, sa de modiga lilla flickan.

I ett inte färdigbyggt hus i Plateau Karavia fann sig barnen instängda. De var ensamma i det förfärliga huset, medan terroristerna diskuterade utomhus. De modiga barnen lyckades likväl fly genom att ta sig ut genom ett fönster, som inte var stängt. De sprang

En ne-finkonstruita domo, en Plateau Karavia, la infanoj trovis sin enfermitaj. Ili estis solaj en tiu domaĉo, dum la teroristoj diskutis ekstere. La bravaj infanoj tamen sukcesis eskapi, elirante tra nefermita fenestro kaj forkuris kaj petis sekuron proksime al bonkoruloj.

La municestro, laŭdante la kuraĝon de tiuj eksterordinaraj infanoj, tiuokaze uzis la okazon por atentigi ĉiujn parencojn havantajn infanojn vigili ĉar la situacio montriĝis multe pli terura ne nur al infanoj sed ankaŭ al la tuta loĝantaro, kaj instigas al lokaj sekurec-prizorgantaj instancoj obstine cerbumi por malkuraĝigi tiun aliforman malsekurecon! Forte kortuŝita, la municestro rekomendis medicinan prizorgon por tiuj kuraĝemaj infanoj antaŭ ol enŝipigi por revenigi ilin al iliaj hejmoj.



Sur la bildo: **La municestro kun la kidnapitaj infanoj.**

Granda emocio estis evidentiĝinta, kiam parencoj ekvidis siajn infanojn denove revenantajn hejmen post sia malapero, fakte ĉar ili ekpensis pri tre malbona novaĵo kiu estus atinginta iliajn infanojn. Tio okazis kelkajn tagojn post la malkovro de tri senvivaj infankorpoj apud rivero, distranĉitaj per maĉeto en alia kvartalo.

For de etnaj konfliktoj kiuj torpedas kaj disŝiras la tutan landon, ĉefe oriente kaj sude! Ŝtelado de infanoj ankaŭ montriĝas kvazaŭ ia komerco en Uvira, Goma, Likasi kaj Lubumbashi, kio staras kiel prizorgenda afero en la lastaj monatoj.

/Espoir Kasati

iväg och bad om skydd hos godhjärtade människor i närheten.

Stadsdelschefen berömdede barnens mod. P.g.a. de här enastående barnen använde man tillfället till att göra alla föräldrar med barn vaksamma på att situationen visade sig vara mycket värre än tidigare – inte bara för barn utan också för hela befolkningen – och man beordrade de lokala säkerhetsinstanserna att ihärdigt söka lösningar för att hålla nere denna annorlunda form av otrygghet. Starkt berörd rekommenderade stadsdelschefen medicinsk undersökning av dessa modiga barn innan man satte dem på en båt för att återföra dem till sina hem.

På bilden: **Stadsdelschefen med de kidnappade barnen.**

Stor sinnesrörelse märktes när föräldrarna återsåg sina barn, som återkommit till sina hem, efter att ha varit försvunna. Föräldrarna hade faktiskt befarat att något mycket hemskt hade hänt deras barn. Den här händelsen inträffade några dagar efter upptäckten av tre livlösa barnkroppar vid floden, sönderskurna med machetes i ett annat kvarter.

Vi behöver komma bort från etniska konflikter, som sliter sönder hela landet, framför allt i öster och söder. Stölder av barn visade sig också vara ett slags handel med barn i Uvira (i norr), Goma, Likasi och Lumumbashi (i söder) och är nu under de senaste månaderna ett problem, som måste åtgärdas.

/Espoir Kasati

Försök till översättning till svenska: Siv



# Minembwe – profunda tomo por Banjamulengoj

*Minembwe estas altebenaĵo, kiu etendiĝas tra tri teritorioj, nome: Uvira, Mwenga kaj Fizi en Sud-kivu-provinco Oriente de DR. Kongo.*

*Banjamulengoj estas unu el la 450 triboj troviĝantaj en Demokratia Kongolando. Tiu tre minoritata bovpaŝtista popolo ruandodevena alfrontas tre akutan malfacilan vivon en Minembwe, altebenaĵo traloĝata de kvin triboj nome: Babembo, Bafuliro, Banjindo, Baviro kaj Banjamulengo. Tiu lasta tribo estas multe pli minacata, disbatata de la ceteraj kvar, kio kaŭzas multiĝadon de, laŭdire, memdefendaj ribelul-grupoj en tiu regiono, sed tio trafluas la tutan spacon de la Sud-kivu-provinco.*

Nekalkulebla nombro da homoj el inter ĉiuj tiuj triboj perdis ĉion por si, kaj havaĵojn kaj familianojn, el kiu mi ankaŭ estas viktimo pro ĉiamaj interbataloj. En la pasintaj monatoj ribeluloj, nomataj Maï-Maï, atakis kelkajn vilaĝojn, kie loĝas Banjamulengoj kun siaj brutoj, mortigis milojn da bovoj, kiuj estas rigardataj kiel nura havaĵo de tiu kompatinda paŝtista popolo tre minoritata; siafoje Gomino kaj Twigwaneho, ribeluloj sin konsiderantaj kiel defendantojn de tiu minoritata popolo (Banjamulengidoj), same replikis per militatako kontraŭ Maï-Maï. La registaro daŭre prisilentas tiun situacion en Sud-kivu, tamen, bedaŭrinde, en kiu miloj da homoj forpasas kaj infanoj perdas siajn parencojn ambaŭflanke. Tiu konflikto estas ano de tiuj du sociaj grupoj, transdonata de generacio al generacio, semante malamon

inter junuloj, kiuj finfine fariĝas ribeluloj pro venĝemo. La ŝtata militistaro ne scias kontraŭ kiu batali, ĉar Twigwaneho kaj Gomino batalas kontraŭ Bavira, Banjindu, Babembe, Bafuliru; kaj Maï-maï kontraŭ Banjamulengoj. La vera kialo de tiu daŭra obstina batalado estas, ke la kvar unuigintaj triboj asertas ke Banjamulengoj volas alproprigi Minembwe al si; kontraŭe tion neas Banjamulengoj kaj diras ke tiuj kvar triboj devigas ilin reveni al Ruando, dum tiuj lastaj ne plu havas lokon en Ruando kaj konsekvence havas la kongan civitanecon. Tial persistas militado tiuregione kaj ĝis nun ili plubatalas...

/Espoir Kasati.

**La Demokrata Respubliko Kongo krom la etnaj problemoj ankaŭ alfrontas la koronviruzon kaj la multajn senhejmajn homojn post tertremoj kaj vulkanerupcioj proksime al Goma.**

**Espoir skribis al UNHCR en Tanzanio, petante protekton, sed ricevis la respondon ke tro multaj rifuĝintoj bezonus helpon. Bone tamen ke li havas komputilon. Li serĉas, serĉadas pacan landon. Li bone regas la francan, la anglan, Esperanton kaj la svahilan. Li – post sufiĉe multaj fuĝoj troviĝas en la iama Katanga, kie oni minacas homojn el lia « tribo ».**

**La retadreso de Espoir estas [espoirkasati@gmail.com](mailto:espoirkasati@gmail.com) //Siv**



# La monda tago de rifuĝintoj, la 20an de junio



## Mesaĝo de UEA okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj, 20 junio 2021

[Sendita al EKOSOK, al la Departamento de UN pri Tutmonda Komunikado (UNDGC) kaj al la Konferenco de Neregistaraj Organizo (CoNGO).]

Universala Esperanto-

Asocio (UEA) salutas Unuiĝintajn Naciojn, la Altan Komisionon de UN por Rifuĝintoj kaj speciale ĉiujn rifuĝintojn okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj, la 20-an de junio 2021. La tago honoras la forton kaj kuraĝon de rifuĝintoj kaj tiujn kiuj helpas ilin kaj celas publikan konscion kaj subtenon al tiuj homoj, kiuj devis fuĝi el siaj hejmoj pro konflikto, persekutado aŭ naturaj katastrofoj.

Lastatempa komunikado de Unuiĝintaj Nacioj klarigas, ke la nombro de homoj forigitaj el siaj hejmoj pro perforto, milito aŭ homrajtaj atencoj atingis **82,4 milionojn en la jaro 2020 – 4% pli ol en 2019. Inter 2018 kaj 2020, preskaŭ unu miliono da infanoj naskiĝis kiel rifuĝintoj.** Laŭ la Alta Komisionestro de UN pri Rifuĝintoj, Filippo Grandi, **pli ol unu procento de la tuta homaro estas perforte dislokita.**

La temo de la nunjara Tago de Rifuĝintoj estas ***Kune ni Saniĝas, Lernas kaj Brilas***. Per tiu temo oni atentigas pri la neceso, ke rifuĝintoj aliru sanajn, edukajn kaj sportajn servojn. Ni saniĝas kune, kiam ĉiuj ricevas la bezonatan prizorgon. Kiam ni lernas kune, ni kreas pli fortan komunumon. Ni brilas, kiam ni ludas kune kiel teamo. Krome, nur inkluzivigo ebligas pli bonan restarigon post KoViM-19.

**La lingva dimensio gravegas.** Per kiu lingvo rifuĝintoj aliru tiujn servojn? Tio ja ne estas facila demando, ĉar oni devas respekti la

devenon de rifuĝintoj, helpi ilian adaptiĝon en nova ĉirkaŭaĵo kaj subteni la plej vastan kaj riĉan edukadon. Multfoje rifuĝintoj ne komprenas aŭ erare komprenas vivsavajn informojn kaj ne kapablas komuniki por peti helpon. Ili suferas, ekzemple, pro lingva handikapeco aŭ malfido kaj alfrontas multajn obstaklojn rilate al lingvo.

Homoj aliras la homajn rajtojn pere de lingvoj. Tiel, la respekto al ies lingvo estas la respekto al tiu homo mem. La lingvaj rajtoj estas ĝuste lingvaj homaj rajtoj. Fronte al tio, la Esperanta movado subtenas lingvan justecon en ĉia komunikado kaj proponas Esperanton kiel unu bona vojo, inter aliaj. **Esperanto povas helpi kaj rifuĝintojn kaj gastigantojn, kiel ilo por interkompreniĝo kaj kultura dialogo.**

Esperantistoj en la tuta mondo partoprenas en agadoj por helpi rifuĝintojn, interalie, per tradukado de gravaj informoj, instruado de lokaj lingvoj kaj de Esperanto. Bona ekzemplo, inter multaj aliaj, estas serio da retejoj kiuj instruas lingvojn kaj donas utilajn informojn pri la vivo kaj laboro en Germanio, Aŭstrio, Slovakio, Rusio kaj Ĉeĥio, pere de multaj lingvoj, inkluzive de Esperanto.

Antaŭ du monatoj, nia Asocio estis inter tiuj kiuj kunvokis virtualan simpozion pri Lingvo kaj Migrado. La simpozio, kiun alparolis inter aliaj la verkistoj Viet Thanh Nguyen kaj Jhumpa Lahiri, kunligis pli ol mil partoprenantojn el kvindek da landoj por pridiskuti interalie lingvajn servojn,

multlingvan edukadon kaj lingvajn homajn rajtojn de rifuĝintoj.

**Per tiuj kaj aliaj elpaŝoj, Universala Esperanto-Asocio invitas ĉiujn informiĝi pri la situacio de rifuĝintoj kaj dislokitaj personoj ene de siaj landlimoj, insisti ĉe siaj**



theodor kallifatides  
@Kallifatides



Jag förstår inte riktigt hur den flyktingstragedi vi bevittnar debatteras som ett större problem för oss än för alla som genomlever den.

**Theodor Kallifatides** (grekiska: Θεόδωρος Καλλιφατίδης), född 12 mars 1938 i byn Molai i Lakonien på Peloponnesos i Grekland, är författare och översättare.

Kallifatides kom till Sverige 1964. Han fick först småjobb lärde sig svenska och studerade filosofi och tog en fil. kand-examen 1967. Han tjänstgjorde sedan som filosofilärare i Stockholm.

Mellan 1972-1976 var han ansvarig för tidskriften "Bonniers Litterära Magasin"

Kallifatides debuterade som lyriker, men fick sitt stora genombrott med sin roman-trilogi om livet på landsbygden i Jalos under och efter den grekiska "borgarkrisen" (Bönder och herrar 1975) Sedan kom fyra romaner om kärlek.

